

**31a ORDINARA DIMANĈO 5an de novembro 2017**

## **ILI NE PRAKTIKAS TION, KION ILI MEM INSTRUAS**

**Komento al la Evangelio de p. Alberto Maggi OSM**

### **El la evangelio laŭ Mateo 23, 1-12**

**En tiu tempo Jesuo instruis la amason kaj siajn disĉiplojn. Li diris: „Sur katedro de Moseo sidas leĝinstruistoj kaj fariseoj. Do, faru kaj observu ĉion, kion ili diras, sed ne imitu iliajn farojn, ĉar ili ordonas sed mem ne faras. Ili ligas pezajn ŝarĝojn malfacile porteblajn, kaj metas tiujn sur la ŝultrojn de la aliaj; sed ili mem ne volas tuŝi tiujn eĉ per fingro. Ĉio, kion ili faras, estas por esti honorataj de la homoj: ili portas ĉirkaŭ sia frunto pli larĝajn filakteriojn ol kutime, kaj la kvastoj de iliaj manteloj estas pli longaj ol tiuj de la aliaj. Ili ŝatas la ĉeflokojn ĉe la festenoj kaj en la sinagogoj; ili deziras esti respektate salutataj sur la placoj kaj esti nomataj rabeno.**

**Sed vi ne lasu nomi vin rabeno, ĉar vi estas ĉiuj fratoj, kaj nur unu estas via Majstro. Kaj nomu neniun sur la tero patro, ĉar nur unu estas via Patro: Tiu, kiu estas en la ĉielo. Kaj ne estu nomataj ĉefoj, ĉar nur unu estas via Majstro: Kristo. Inter vi la plej granda estu via servanto. Se iu klopodos sin altigi, Dio humiligos lin; sed se iu restos humila, Dio honoros lin.”**

Silentiginte ĉiujn siajn kontraŭulojn, laŭvice ili estas la pastroj, la pliaĝuloj, la fariseoj, la herodanoj, la sadukeoj, la leĝinstruistoj, Jesuo kunvokas la amasojn kaj la disĉiplojn por ilin averti kontraŭ ilia instruado. Ĝi estas la lasta alparolo, kiun Jesuo adresas al la amasoj, kaj ĝi estas la plej akra en la tuta evangelio, kial? Ne temas tiom pri polemiko kun la juda komunumo, de kiu la kredantoj jam estis disiĝintaj, sed ĝi estas severa admono, do akceptenda serioze, kiun Jesuo adresas al sia komunumo kaj al siaj disĉiploj, al ĉiuj, kiuj volas sekvi lin, ne imiti tion, kion Jesuo nun kritikas. Ni vidu do la tekston de Mateo, 23-an ĉapitron ekde versiklo 1.

*“En tiu tempo Jesuo instruis la amason kaj siajn disĉiplojn.”*, unuafoje Jesuo turniĝis al la amasoj kaj al la disĉiploj por la surmonta prediko. La evangeliisto intencas diri, ke por travivi la mesaĝon de la feliĉproklamoj oni devas eviti la instruon de la skribistoj kaj de la fariseoj, kiujn Jesuo nun

kritikas. "Jesuo instruis la amason kaj siajn disĉiplojn. Li diris: „Sur katedro de Moseo sidas leĝinstruistoj kaj fariseoj“, kio estas la katedro de Moseo? La Sinjoro estis promesinta al Moseo, ke post li Li starigos profeton similan al li, kaj, por simboli ĉi tiun ĉeeston, ĉu de Moseo ĉu de la venonta profeto, en la sinagogoj unu sidloko restis malplena, ĝi simbolis la ĉeeston de la profeto. Nu, ĉi tiu ĉeesto de la profeto estis trude anstataŭigita, instaligis la skribistoj, tio estas la teologoj, kaj la fariseoj. En la lokon de la profeto, kiu anoncis la kreantan Dion, metigis, anstataŭe, la juristoj, tiuj de iu Dio leĝdonanto. Do Jesuo avertas kontraŭ ilia instruado.

La frazo, kiun nun Jesuo adresas, estas ironia, diras Jesuo: "Faru kaj observu ĉion, kion ili diras, sed ne imitu iliajn farojn, ĉar ili ordonas sed mem ne faras.". Jesuo kritikas ne nur iliajn farojn, li jam nomis ilin hipokrituloj, sed li kritikis ankaŭ ilian doktrinon, li diris, ke ĝi ne venas de Dio, Jesuo diris klare, ke "ili instruas kiel doktrinojn ordonojn de homoj, eĉ pli, por fari tion ili transpaŝas la ordonon de Dio". Do Jesuo ne diras, observu ilian doktrinon, sed ne senkulpigu ilian konduton, ne, nek doktrino, nek konduto. La Dio, kiun ili prezentas, estas la kontraŭo de la Patro de Jesuo. Dum la Patro deziras la feliĉon de la homoj, ĉi tiuj ĉefoj, ĉi tiuj religiaj aŭtoritatuloj igas ĝin nebla.

Do Jesuo daŭrigas kaj kaj identigas ilin. "Ili ligas pezajn ŝarĝojn malfacile porteblajn, kaj metas tiujn sur la ŝultrojn de la aliaj; sed ili mem ne volas tuŝi tiujn eĉ per fingro", al ili interesas nur la doktrino. Se tamen ĉi tiu doktrino, ĉi tiuj ordonoj suferigas la homojn, ne igas ilin liberaj, al ili ne interesas, gravas la observo de ilia doktrino, tiu doktrino, sur kiu ili bazas sian tutan povon kaj sian tutan prestiĝon, kaj por ili estas instrumento de regado de la popolo.

Kaj daŭrigas Jesuo, kaj ĝi estas tre preciza priskribo, kiun oni devas memori, "Ĉio, kion ili faras, estas por esti honorataj", jen la grandega, senbrida ambicio, kiun ili havas, "de la homoj: ili portas ĉirkaŭ sia frunto pli larĝajn filakteriojn ol kutime, kaj la kvastoj de iliaj manteloj estas pli longaj ol tiuj de la aliaj.", temas pri religiaj insignoj, kiuj devis memori preceptojn, ordonojn. Nu, kvankam ili paradas per ĉi tiuj religiaj insignoj, ili ne praktikas ĝuste tion, kion tiuj insignoj estus devintaj memori. Jesuo plu daŭrigas "Ili ŝatas la ĉeflokojn ĉe la festenoj", la ĉefloko estas tiu apud la domomastro, kie oni estas priservataj pli bone kaj pli frue kaj oni manĝas pli bone, dum, kiam ili "ŝatas la ĉeflokojn en la sinagogoj", la ĉeflokoj en la sinagogoj ne estas la antaŭaj lokoj, sed tiuj supraj, malproksimaj de la homoj, do kiam ili devas esti kun la popolo ili distanciĝas. "Ili deziras esti respektate salutataj sur la placoj kaj esti nomataj rabeno.". Ilia tuta ekzisto estas orientita al la servo de sia senbrida memaltigo, deliro de singloro, kiu ne konas limojn, kaj kiu postulas senĉese la subigon de la popolo, en plena reciproka rivaleco, ĉar ili timas, ke iu forŝtelus ilian postenon. Jen kial ili ŝatas esti respektate salutataj kaj esti nomataj rabeno, kio - Dio mia!- egalas al monsinjoro.

Sed jen la instruo de Jesuo: " Sed vi ne lasu nomi vin rabeno, ĉar vi estas ĉiuj fratoj, kaj nur unu estas via Majstro", neniun en la komunumo rajtas meti sin supren, la ununura kiu instruas estas Jesuo, kiu komunikas al ni la Spiriton de la Patro. "Kaj nomu neniun sur la tero patro, ĉar nur unu estas via Patro: Tiu, kiu estas en la ĉielo.". Patro estis tiu, kiu transdonis la tradicion, estis la aŭtoritatulo. Nu, la ununura patro en la komunumo estas la ĉiela Patro, kiu ne regas la homojn eldonante leĝojn, altrudante ŝarĝojn, kiujn ili devas observi. Jen kial Jesuo estis dirinta: "Venu al mi ĉiuj, kiuj estas laborantaj kaj ŝarĝitaj,

kaj mi vin ripozigos.". La Patro ne altrudas doktrinojn, sed komunikas sian amon, komunikas sian amokapablon mem, sian Spiriton.

*"Kaj ne estu nomataj ĉefoj"* (laŭvorte, gvidantoj), *"ĉar nur unu estas via Majstro* (laŭvorte, Gvidanto), *Kristo"*, kaj la finaĵo: *"Inter vi la plej granda estu via servanto"*, la greka termino egalas al diakono. La vera grandulo en la komunumo ne estas tiu, kiu surmetas la ŝarĝojn, sed tiu, kiu metas sin je servado, ĉar, diras Jesuo, *"Se iu klopodos sin altigi,"*, nome, sin altigos super la aliaj, *"Dio humiligos lin;"*, sed *"se iu restos humila,"*, nome, sin metos je servado, *"Dio honoros lin."*. La risko, kiun Jesuo volas eviti, estas tiu, ke en lia komunumo stariĝu interrilatoj pere de la regado de kelkaj kaj la subigo de la aliaj. Tio estas neniel evangelia, neniel kristana. La komunumo de la sekvantoj de Jesuo estas komunumo de gefratoj, kie la unuj vivas por la bono kaj la bonstato de la aliaj.